

IPR

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031

Jarkolekto 40 - trimonata

10/2

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:

Filomena Canzano

Augusto Casquero

Duncan Charters

Renato Corsetti

Alberto Flores

Heidi Goes

Mireille Grosjean

Dennis Keefe

Arlain Kizeyidioko

Zsófia Kóródy

Ilona Koutny

Katalin Kováts

Karina MacGill

Stefan MacGill

Maria Majerczak

Ludoviko Molnár

Edit Újvári

Penny Vos



ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Jozefo NÉMETH: <i>Enkonduko</i>	3
Duncan CHARTERS: <i>Konferenca temo kaj faka laboro en Kubo</i>	4
Stefan MACGILL: <i>Du nepraĵoj por progresi</i>	8
<i>Forpaso de Maŭro La Torre</i> (CHARTERS, CORSETTI kaj aliaj...).....	10
Ilona KOUTNY: <i>E-o kaj interlingvistiko en superagradaj lernejoj</i>	17
Mireille GROSJEAN: <i>Propedeŭtika (helpa al lernado) valoro de E-o</i>	20
Katalin KOVÁTS: <i>Post sukcesa komenco ĉu simila daŭrigo?</i>	23
Zsófia KÓRÓDY: <i>Dujara Comenius-projekto finiĝis en Herzberg</i>	25
<i>El la landoj kaj sekcioj</i> (AT, BR, CN, DK, DE, HU, CD, PL).....	28
<i>Por via notlibro</i> (K. KOVÁTS, Zs. KÓRÓDY, H. GOES).....	35
<i>Labortable</i> (Stefan MACGILL).....	40
<i>Informoj pri ILEI</i>	41

Titolpaĝe: Maŭro La Torre forpasis (foto de Paul PEERAERTS)

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Stefan MACGILL, Pannónia u. 30.I.6, HU-1136 Budapest, Hungario.
Tel. (+36 1) 349-5207, <stefan.macgill@gmail.com>.

Eksteraj rilatoj, kunordigo, konferenco, regularoj.

Vicprez.: Duncan CHARTERS, PO Box 100, Elsah, Illinois 62028-0100, Usono.
Tel. (+1) 618 3745252, fakso: (+1) 618 3745465, <duncan.charters@gmail.com>.
Universitata kaj scienca agado/komisiono, instru-teknologia evoluo.

Sekretario: Małgosia KOMARNICKA, adreso ĝis 15 junio 2010: E-Centro,
Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio.
<margareta.ilei.pollando@gmail.com>. Sekretariaj taskoj.

Estrarano pri financoj: Julija BATRAKOVA, Rusio/Hago, Nederlando. Tel. (+31)
252 515331, <persiko@mail.ru>. Financaj kaj kasistaj aferoj.

Estrarano: Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412
Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983,
<zsofia.korody@esperanto.de>. E-centroj, instrukapabligado, ekzamenoj.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak,
Serbio. Tel. (+381 32) 371053, fakso: (+381 32) 342101, <radojica.petrovic.rs@gmail.com>. Edukprojektoj, informado, Konf. 2011, terminara komisiono.

Estrarano: Julián HERNÁNDEZ ANGULO, Arbol Seco 371B e/Clavel y Santo
Tomás, Centro Habana, Ciudad Habana, Tel. (+53) 6404484,
<julian@esperanto.co.cu>. Landa agado, komisiono pri lerneja agado.

Estrara komisiito por la Konferenco en Kubo: Ana MONTESINOS DE GOMIS,
Britio, <anamontesinos.esper@btinternet.com>.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Vicprezidanto: Detlev Blanke,
Germanio, Prezidanto de la Societo
pri Interlingvistiko

Membroj:

Vera Barandovská-Frank,
Germanio, Universität Paderborn;
AIS² San Marino

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elŝah

Renato Corsetti, Italio, Università
degli Studi di Roma „La Sapienza”;
AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute, Kolkata;
AdE¹

Michel Duc Goninaz, Francio,
Université de Provence; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių
universitetas

Wim Jansen, Nederlando,
Universiteit van Amsterdam

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Ilona Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu; AdE¹

Maria Majerczak, Pollando, Uniwer-
sytet Jagielloński w Krakowie

Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia
Universitato de Paranao; AdE¹

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяйственного
Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet

Sekretario: Aida Čižikaitė, Litovio

¹ AdE – Akademio de Esperanto

² AIS – Akademio Internacia de la
Sciencoj, San-Marino

Enkonduko

Karaj Legantoj,

vi tenas en viaj manoj numeron, kiu plenas je kontrastoj. Bonaj kaj mal-bonaj novaĵoj svarmas sur la paĝoj. Jam titolpaĝe vin renkontas la ŝoka informo: Maŭro LA TORRE forpasis. Kelkajn semajnojn antaŭ lia morto, ni interŝanĝis mesaĝojn. Li menciis, ke li estas en hospitalo, sed mi eĉ ne demandis lin pri lia malsano, ĉar li daŭre ŝajnis havi sian tipan bonan humoron. Nun mi ne plu povas demandi lin... Mi memoras, kiam antaŭ 10 jaroj mi devis festi sola Kristnaskon, tiam li tiel konsolis min: "Prefere soli, ol esti en malbona kompanio...". Kara Maŭro, Vi jam estas en bona societo... do, anstataŭ "adiaŭ!" mi diras "ĝis revido!"... Kiam mortas amiko, oni komencas pensadi pri la senco de la vivo. Por esti eĉ iom pli intima: hodiaŭ mi havas duoblan kialon por pripensado, ĉar ĝuste hodiaŭ mi iĝis 50-jara. Kaj anstataŭ festi, mi klopodegas fermi la revuon kaj verki la Enkondukon... Feliĉe, mankas plia spaco... ☺

Do, mi kore dankas
la laboron de ĉiuj
kunverkintoj kaj
kunlaborantoj.
Bonan legadon!

Jozefo NÉMETH,
redaktoro
28 aprilo 2010



Konferenca temo kaj faka laboro en Kubo

de **Duncan CHARTERS**, Vicprezidanto de ILEI
(Usono)



Al UNESKO pasintjare UN aktive komisiis evoluigi diskutadon kaj agadon surbaze de sia deklaro, ke 2010 estu la Internacia Jaro por la Proksimiĝo de Kulturoj. UEA jam deklaris sian intencon esti kunlaboranto al tiu celo, ne nur per deklaro ke la Kongresa temo estos paralele Interproksimiĝo de kulturoj, sed per aktiva instigo de okazoj pritrakti la temon kaj prepari ĝin en la paĝoj de la revuo 'Esperanto'.

Kion do povos alporti ILEI en sia pritrakto de la propra Konferenca temo "Edukado por kultura proksimiĝo", kaj en la faka laboro kaj kadre de la trejnoseminario por junaj instruantoj de la lingvo, kiu estos ĉi-jare notinda parto de la Konferenco mem?

En mia artikolo pri la Kongresa temo de la UK aperinta en la marta numero de la revuo 'Esperanto', mi reliefiĝis kelkajn konsiderojn kiuj sentiĝas ĉe la kerno de tiu temo en la hodiaŭa mondo. Jam en sia kolekto *Rimletero*, kiun li kunverkis kaj eldonis kun Marjorie BOULTON en 1976, atentigis nia karmemora poezia korifeo William AULD ke:

*La diferencojn oni jesas,
silentas pri l' similoj – emo
en kiu fontas la problemo:
kaj mison, kies fort' ne ĉesas,
sur la infanajn cerbojn presas.*

Kiel atentigas en sia artikolo nia prezidanto Stefan MACGILL, ni urĝe bezonas profesiigon en la eduka laboro por E-o. Tio signifas unuavice, ke la tuta movado kune plene komprenu la unikecon de la valoro instrui E-on kaj dediĉu al la tasko la rimedojn, kiuj ebligas al ni komprenigi ties sekvojn al la mondo. Tiu valoro troviĝas en la fakto, ke ĝi kondukas infanojn kaj plenkreskulojn al rekono unue de la "similoj" inter homoj diversnaciaj, diversetnaj, diverskulturaj. Kiam ni sekve konstatas, ke la esprimo de kune akceptataj valoroj pli profunde kompreniĝas, se ni pretas ilin observi tra la

lenso de kultura diverseco, la “diferencojn” ni povas saluti, respekti, ĝui kaj alpreni por forigi antaŭjuĝojn kaj funde ŝanĝi nin mem, tiel pli-proksimigante kaj pliriĉigante ĉiujn niajn homajn rilatojn.

Ni memoru la vortojn de la Manifesto de Prago:

Ĉiu etna lingvo estas ligita al difinita kulturo kaj naci(ar)o. Ekzemple, la lerneĵano kiu studis la anglan, lernas pri la kulturo, geografio kaj politiko de la anglalingvaj landoj, precipe Usono kaj Britio. La lerneĵano kiu studas E-on, lernas pri mondo sen limoj, en kiu ĉiu lando prezentiĝas kiel hejmo. Ni asertas, ke la edukado per iu ajn etna lingvo estas ligita al difinita perspektivo pri la mondo. Ni estas movado por transnacia edukado.

Kion ajn individuo povas opinii pri E-o, neniuj alia lingvoj, kiujn oni povus lerni, kapablas malfermi samtempe perspektivojn al multoblaj kulturoj, surbaze de la neceso de reciproka kompreno, ne bazita sur la heredaĵo de unusola kulturo. Ni mem komprenu la kialon de tio, kaj pretiĝu por kiel eble plej klare kaj konvinke informi niajn samterglobanojn kaj iliajn reprezentantojn en la instruprofesio. Tio bezonos dediĉon kaj financajn rimedojn por certigi laŭŝtupan paŝadon al la celo diskonigi tion, kion ni kapablas donaci al la mondo.

Mi memoras konferencon por lingvoinstruistoj, en kiu lernantino de mezlernejo klarigis siajn spertojn en klaso dediĉita al sociaj studoj. Ŝiaj gepatroj donis al ŝi ne nur la eblon lerni E-on, sed ankaŭ vojaĝi kaj korespondi per la lingvo. Kun kia rezulto por la klaso? Ŝi alportis spertojn kaj sciojn multe pli riĉajn ol tiuj de ĉiuj aliaj klasanoj kune. Por siaj esplor-projektoj, ŝi utiligis preskaŭ cent malsamajn kontaktojn kun gejunuloj tra la tuta mondo. Ne nur impresiĝis ŝiaj samklasanoj, instruistoj kaj la ĉeestantoj de ŝia prezentaĵo ĉe la konferenco, sed tiom vastiĝis ŝiaj intelektaj horizontoj, ke ŝi devis poste elekti inter invitoj por studi en la plej prestiĝaj universitatoj de la lando.

Jen konkreta ekzemplo de la eksterordinaraj ebloj, kiujn proponas al la mondo nia fenestromalferma lingvolanĉilo. Tiun fenomenon ekspluatis kompreneble la projekto Interkulturo, kiun dum jaroj flegadis nia Maŭro LA TORRE, kies signifoplenan kontribuon ni nun aparte memoras. Ĝuste pro tio, en la ĉi-somera seminario en Matanzas, Kubo, ni dediĉos apartan spacon al la celoj kaj metodoj de la projekto Interkulturo, kaj al la ebloj daŭrigi kaj plivastigi la koncepton kaj ĝian efektivigon.

Kio alia estas bezonata, kaj kion povos faciligi la instruado de Esperanto? Efikan interkulturan trejnadon. El kio tio konsistas? Unue memkonsciiĝo, kaj poste la aktiva lernado de strategioj por faciligi interkulturan komunikadon. Restas klare en mia memoro konstato de Alvino FANTINI, kiu kunlaboris en projektoj pri la instruado de E-o dum sia laboro dum jardekoj kiel direktoro pri fremdaj lingvoj ĉe SIT, la Lernejo por Internacia Trejnado en Vermonto, kiu gastigis dum kelkaj jaroj la Nordamerikan E-kursaron. Specialistoj pri interkultura trejnado konstatis, ke individuoj, kiuj havas naturan aŭ trejnitajn talentojn pri interpersona komunikado, plejofte sukcesas ankaŭ pri interkultura komunikado. Kial? Ĉar la samaj kvalitoj, kiuj faciligas unu el tiuj, necesas por la alia. La persono, kiu scias vere aŭskulti alian por lerni ion, kio ŝanĝos akceptitan perspektivon, multe pli efike komunikos ol tiu, kiu ĉiam serĉas la okazon komprenigi siajn proprajn ideojn kaj konvinki aliajn pri ili. Tiu kiu kapablas aŭskulti kaj precize resumi kompreneme ideojn, kiujn esprimis samkonversaciano, havos la valoran talenton kontribui al la solvado de disputoj naskiĝintaj de netoleremo bazita sur konsciaj aŭ nekonsciaj antaŭjuĝoj aŭ malamoj, aŭ sindefendemo kontraŭ perceptitaj atencoj al la propraj valoroj kaj vivkonceptoj.

Toleremo tamen facile predikeblas: preskaŭ ĉiu difinas sin kiel esence "tolereman". Tamen du avertojn ni konsciu. Unue, toleremo ne signifas ke oni ne havu proprajn valorojn, aŭ ne havu la kuraĝon ilin esprimi – kvankam sen intenco ofendi, aŭ ofendiĝi se tiu esprimado rezultigas deklarojn de kontraŭaj sintenoj. Lerni kiel ne ofendi kaj ne ofendiĝi estas pli ol scienco: tio esta vera arto, kiun ni malfacile majstras. Kaj due, kiel prave atentigis Geoffrey GREATREX en sia artikolo en la aprila numero de la revuo 'Esperanto', ĉu pro "toleremo" ni ne rajtas kritiki iun ajn aspekton de alia aŭ "fremda" kulturo, eĉ se difinitaj deklaroj kaj agoj laŭ nia sincera konscienco atencas niajn moralajn sentojn kaj la esencon de tio, kion ni vidas kiel bonan kaj benan por la homaro?

Ni ĉiuj emas akcepti la identecon, kiun difinas niaj familiaj kaj hejmaj cirkonstancoj, niaj etnaj kaj naciaj valoroj, niaj moroj kaj kutimoj. Se ni tamen komencus identigi nin mem, niajn familianojn, niajn kolegojn kaj amikojn surbaze de la admirindaj kvalitoj, kiujn esprimas ilia karaktero, ni perceptus la esencon, kiu kunigus anstataŭ dividi kaj fremdigi. Ni ankaŭ pli klare perceptus tiujn trajtojn kaj egoismajn pensmanierojn, kiuj ne

koincidas kun niaj idealoj kaj malutilas al kunlaborado kaj progreso. Tamen la aŭtentika toleremo, aŭ senkondiĉa akcepto de la rajto de ĉiu bone motivita homo konduti kaj esprimi ideojn, pri kiuj ni principe aŭ provizore povas tute malkonsenti, havas en si la eblon kunligi kaj kunsentigi eĉ la plej malsamajn homojn. Persono kiu sentas malfalsan amon al ĉiuj kaj deziron kompreni ilian vivsintenon por progresigi la propran, akiris la fundamenton de la kunlaboremo. Individuo dediĉita al bonfarado kaj plifaciligo de alies vivkondiĉoj laŭ ilia koncepto de la bezonoj plejofte nature kaj sukcese interkomunikiĝas. Homo kiu rifuzas juĝi aliajn surbaze de propravole elpensitaj kriterioj kaj konkludoj, jam atingis tiel multe pli ol supraĵa konanto de amuzaj aŭ primokeblaj diferencoj inter kulturparoj. Akceptinto de diverseco en la esprimado de universalaj valoroj etikaj kaj kulturaj komprenos esencajn verojn, kiujn ne povas percepti individuo katenita al la limoj de la vidpunktaro de difinita lingva, etna, nacia, aŭ kultura popolo aŭ grupo.

Ĉu ni konscie elserĉas la valorojn, kiujn povas alporti al ni aliaj kulturoj nekomforte malsamaj al la niaj? La artikolo de Miyamoto MASAO, verkita en 1970 kaj represita en la maja numero de la revuo 'Esperanto' ĉi-jare, restas tiel aktuala kiel kiam ĝi verkiĝis. Kion signifas por ni kaj nia kompreno de niaj kunhomoj la koncepto de Kuba poeto José MARTÍ, ke “gepatrolando estas homaro” kiel klarigite de José Antonio VERGARA en la sama numero? Se ni restas supraĵe turismemaj en niaj mondvojaĝoj, kaj ne pretas lukti por kompreni tion, kio estas plej kara por samteranoj, kiuj ne dividas nian geografion, nian historion, nian kutimaron, kulturan perspektivon, lingvon aŭ lingvojn konatajn al ni, ni riskas kondamniĝi kiel pseŭdo-internaciistoj, neindaj je konsidero de la solvo, kiun ni proponas. Por fari kion? Por progresigi tiun tutmondiĝon, kiu ne vekos protestojn de kulturatencado, sed male konservos la buntecon de la homa lingvaro kaj kulturaro, proponante paradokse unu universale alireblan instrumenton de reciproka kompreniĝo.

Tamen kiel tio rilatas al la instruado de la lingvo E-o, se entute ĝi rilatas? Ne necesas konsenti pri la respondo. Tamen se ni ne pretas profundigi en tiun temaron, ni riskas flankenigi nian lingvon al la margenoj de la socio, anstataŭ montri, ke ĝi povas situi en la kerno de "nova monda ordo", kiun rajtas difini ne politikistoj sed veraj tutmondanoj posedantaj unikan instrumenton por ebligi sendiskriminacian, senpartian, senkondiĉe aŭtentikan pliproksimigon de kulturoj.



Du nepraĵoj por progresi

de **Stefan MACGILL**, Prezidanto de ILEI (Hungario)

Proksimiĝas nia konferenco, ni apelacias je pli da aliĝoj. Proksimiĝas la UK kaj ILEI engaĝas sin aktive tie, precipe ĉe la kongresa temo. Proksimiĝas la momento, kiam la rekonsistigita komitato de UEA en Havano akceptos la *Strategian Planon* por la periodo 2011-2020. Estas nepra tasko de ILEI forte interveni tie, por zorgi, ke la ŝlosila rolo de edukado restu prioritata, kiel en la plano 2000-2010. Tie kernis la tri pilieroj: informado, instruado, uzado. Gravas, ke la nova plano ne perdu tiun bazan strukturon, nek ĝian emfazon pri pliprofesiigo de nia agado. La nova plano devas ne nur konservi la emfazon je la instruado de E-o, ĝi devas konkretigi la agojn kaj planojn, kiuj donos substancon al la celoj. Tiu konkretigo mankis en antaŭaj planoj de UEA, same ĉe ILEI.

Tiu profesiigo devas signifi ne nur, ke amatoroj kaj libervoluloj agu pli profesie (laŭdinda), sed ke ni fakte dungu oficistojn aŭ volontulojn aŭ almenaŭ honorariu amatorojn, kiuj pruveble liveris profesii-nivelajn rezultojn. Tiuj oficistoj unue garantii la bazan administradon (kiel nun), sed krome subtenu la disvastigajn agadojn, niakaze, la kampanjojn vastigi la instruadon de E-o. Tiu profesiigo ĉe eduka agado devas okazi je du niveloj – unu restas ĉe ILEI, la alia koncernas la tutan movadon. Pri tiu alia, ILEI havas gravan defion interveni ĉe UEA kaj la movado por akceptigi la unuan suban nepraĵon. La mesaĝo al ili devas esti – ILEI estas pli ol nur unu plia faka asocio (same kiel –ig- kaj –iĝ- estas pli ol nur simplaj sufiksoj!)

ILEI havas taskon servi sian membraron kaj disvastigi E-on inter la instruistaro kaj en edukaj medioj. Sed la pli ambicia tasko konvinki registarojn, estrojn, lernejestrojn kaj gepatrojn, ke indas la instruado de E-o, kaj ĝi apartenas ne nur al ILEI, sed al la tuta movado.

Ĉiu nova estraro de ILEI havas devon frue en sia mandato proklami sian ĉefcelon. Ni ĉi-foje hontige malfruas fari tion. Pli frue ne eblis, pro la superpeza amaso da tiaj plenumendaj praktikaj taskoj. Ĉiu pasanta lukto-tago nur pli konvinkas nin pri la decido pri tiu prioritato:

Ni bezonas profesiigon en la eduka laboro por Esperanto.

Ni atingu tion per du nepraĵoj. La unua devas esti enkonstruita en la *Strategia Plano* ĉe UEA. Supozante, ke edukado restos kerna, necesas konkretigo por ke la prioritatproklamo ne restu vanta ŝvebaĵo.

Nepraĵo unua: Ĝis la fino de la mandato de la nova estraro de UEA (2010-2013) estu dungita ie en la mondo oficisto aŭ UEA-stila volontulo, kies ĉefa tasko (almenaŭ 75%) estas akceli kampanjojn enkonduki E-on en oficialajn stud-programojn kaj subteni la realigon de tiu instruado.

La ĝusta interrilato: ILEI provizas per la fakaj scioj kaj fortoj, la movado per la organiza kaj financa bazo por tio. Tiu modelo ne estas tiom fremda, de jaroj deĵoras en la CO volontulo por TEJO, kial ne same por la prioritatproklamita eduka laboro? Povas esti volontulo aŭ oficisto kun la specifa tasko apogi la interrilatitajn kampojn de informado, instruado kaj uzado. ILEI evidente havu iujn rajtojn doni taskojn kaj evoluigi projektojn kun tiu homo, kiu povus esti bazita en la CO aŭ en iu alia E-centro.

La dua nepraĵo restas ĉe ILEI, kie la taskamaso renkontas ĉiam pli da prokrastoj. Mia enkonduko en IPR 2009/3 skizis strategion aktivigi niajn komisionojn, ligante ilin rekte kun estraranoj. Ni devas tamen konstati, ke tio malmulton portas al la bezono distribui la laboron pli akcepteble en la ligo. Por ke ILEI fakte plenumu siajn celojn kaj kontentigu la membraron, ni venas al la dua nepraĵo.

Nepraĵo dua: Ĝis la fino de la mandato de la nuna estraro de ILEI (2009-2012), la Ligo trovu kaj financu oficiston aŭ volontulon, kiu prizorgu la bazan kaj ekspansiigan ligan laboron, lasante al la estraro gvidi la laboron, sen la neceso mem plenumi preskaŭ la tuton de tiu ŝarĝo.

Tiu oficisto gardus niajn dokumentojn, datumojn, procedurojn kaj helpus al novelektitoj rapide kompreni kaj ekmaĵstri siajn rolojn. Kiel ni konkrete realigu tiun nepraĵon – trovi konvenajn kandidatojn kaj transformi la financadon de la ligo – jen temo por aliaj artikoloj kaj planoj. Nepras prepari plenan taskmenuon, por ke ni sciu kiom kaj kion povu plenumi oficisto. La nuna artikolo almenaŭ klare kaj grandlitere starigas la ĉefcelon de la nuna jartrio. Kion ajn alian ni atingos aŭ malatingos ĝis julio 2012, la mezuro de la (mal)sukceso de la mandato de la nuna estraro devas esti: kiomgrade ni atingis la du nepraĵojn.

FORPASO DE PROFESORO D-RO MAŬRO LA TORRE

de **Duncan CHARTERS**, Vicprezidanto de ILEI (Usono)

Karaj ILEI-anoj,

En funebra ceremonio por Maŭro LA TORRE okazinta en lia universitato la 27-an de marto, jam transdonis kondolencon de la estraro de ILEI lia samurba kolego kaj universitatnivela kunlaborinto en multaj projektoj, Renato CORSETTI. Pri la signifo de lia laboro kaj la korskua novaĵo pri lia forpaso jam esprimis sin multaj esperantistoj en la [*e-ins*]-listo kaj aliloke. Mi do detalos kiel reprezentanto de la nuna estraro de ILEI, por memorigo aŭ klarigo por tiuj, kiuj ne konis lin, spertojn, kiuj por mi montris lian dediĉitan subtenadon de la instruado de E-o, kaj ne malpli grave, la kolegon kaj la homon.

Niaj personaj kontaktoj estis malmultaj, sed signifaj. Li transprenis de mi la prezidantecon de ILEI okaze de elektiĝo post serĉado de la ĝusta homo por situacio, en kiu malfacilis kelkaj cirkonstancoj. Li montriĝis esti tiu homo. Mi rimarkis dum konsultiĝo lian naturan deziron ne kritiki aliajn, sed kunlabori kun ĉiuj kiom eble por la bono de la Ligo. Li alportis novan perspektivon kaj novajn rekonojn por la lingvo kaj por ĝia instruado.

Maŭro forte emis apogi aliajn kunlaborantojn kaj plifaciligi iliajn klopodojn, aparte kiam temis pri la instruado de E-o. Tio estis unu motivo de la iniciato de la projekto Interkulturo, kiu daŭre evoluos, ĉar ĝi montras unikan edukan potencialon de la lernado de nia lingvo por interkultura kompreniĝo.

Maŭro studis kaj esploris pri la lingvo je nivelo, kiu pravigis elekton al la Akademio de E-o. Tamen li aparte ĝojis pri la apliko, kiam li povis proponi helpon al junaj lernantoj, por ke ili pli rapide kaj pli bone konatiĝu kun la lingvo kaj kulturo, kiu plej efike ebligas transnacian komunikadon kaj lernadon.

Lia atento al ebloj diskonigi E-on en serioza profesia kunteksto montriĝis en invito al mi fari kontribuon al numero de la itala universitata revuo, kiun li kunredaktis, *Istruzione a Distanza*. Temis pri nia sperto en Usono koncernanta la instruadon de la lingvo kaj la plifortiĝon de la movado, kiu

rezultis de diversmaniera neĉeesta instruado antaŭ la teknologia epoko. En sia propra universitato, la Tria Universitato de Romo, lia laboro kun kolegoj atingis, ke per la aldono de neĉeesta lernado al la klasejaj kursoj, la studentaro kreskis de 6000 al 18000. Mi aldonu, ke iniciatoj universitat-nivelaj ĉe mia kolegio profitos de la sperto, kiun li volonte dividis kun mi dum interkonsultado.

Li mem aktive partoprenis en la agado de ILEI kaj ĉiam volonte prezentis klerajn referaĵojn teoriajn, instrutemajn aŭ edukajn en simpozioj, konferencoj kaj kongresoj. En Bjalistoko li prelegis, kaj la ĉeestintoj de la prezentado de ILEI kaj de ĝia agado al la publiko memoros liajn klerajn kaj kuraĝigajn aldonojn al la rimarkoj de la partoprenantoj.

Laste, el persona perspektivo jen du anekdotoj. Kiam mi vizitis lin en lia oficejo, li havis rendevuon kun studento, kiun li konsiladis pri lia doktora disertacio. Li plene atentis la bezonojn de la studento kaj pacience, subteneme klarigis kaj kuraĝigis, por ke lia laboro daŭre progresu. La studento siaflanke montris sian respekton kaj dankemon pro lia malavara helpemo, kaj tion mi rimarkis ankaŭ inter kolegoj kaj helpantoj. Intertempe, li provizis ĉion kion mi povis bezoni por mia laboro: spacon, aliron al la reto, komforton, senton de enhejmiĝo.

Antaŭ du jaroj en Amsterdamo [*vd la foton*], okaze de la interlingvistika konferenco, Maŭro specife invitis min al manĝo kaj mallonga ekskurso kun sia familio, kaj mi aparte ĝuis la konatiĝon, kunestadon kaj ankaŭ tion, kion mi lernis pri la urbo pro liaj scioj. Tiam mi vidis la samajn amemajn kaj subtenajn rilatojn, kiujn li havis kun la tiam ĉeestantaj edzino kaj filino, kaj mi sentis min jam inkluzivita en lia familio.

Eble tio simbolas kiu kaj kio estis Maŭro por mi kaj por tiel multaj aliaj. Ne elĉerpas la liston de liaj kvalitoj, liaj intelekta kapablo, iniciatemo, sincera dediĉo al nia afero, malavareco kaj inkluzivemo, sinteno trankvila tamen kuraĝiga, interesiĝo pri la bonfarto de aliaj, komprenemo pri cirkonstancoj, kiuj povis malfaciligi ies agadon, kaj deziro



ĉiel helpi por solvi tiajn situaciojn. Ĉio kune montras grandan homon, kies kvalitoj restos eterne kun ĉiuj, kiuj lin konis kaj kiujn li servis. Kaj certe kun ni kaj kun lia familio, kiu akceptu la kompaton de liaj kolegoj kaj amikoj en tiu korŝira momento, kiam nia konsolo estu la memoro pri ĉio bona kaj progresema, kiu restas kun ni kiel heredaĵo de lia vivo kaj de lia karaktero.

Maŭro LA TORRE – memoroj de amiko

de **Renato CORSETTI** (Italio)

Maŭro naskiĝis en Romo (Italujo) en 1946, vizitis la lernejojn ĉi tie kaj, kiel multaj el la plej famaj esperantistoj, memlernis Esperanton en 1962, per lernolibreto, per kiu, laŭ multaj fakuloj pri pedagogio, oni ne povus lerni ion ajn.

Li poste finstudis pri matematiko en 1974 en la Roma Universitato "La Sapienza" kun disertaĵo pri matematika lingvo-scienco. Jam tiam liaj kontaktoj kun lingvistoj kaj lingvoscienco iĝis tre intensaj.

Ekde la 1974-a, dum 15 jaroj, li instruis en bazlernejoj, samtempe laborante por instruista trejnado, kunlabore kun itala instruista asocio de demokratiaj instruistoj. Temis pri delikata maniero por aludi al politike maldekstraj instruistoj. Maŭro ne nur kunlaboris kun tiu asocio, sed iĝis unu el la kolonoj de ĝi, verkis librojn pri instruado, gvidis kursojn ktp.

Dum siaj studentaj jaroj kaj en la unuaj jaroj de instruado, li multege aktivis por E-o en Romo, en Italujo kaj internacie. En 1969 aperis nia komuna "*Ĉu vi parolas tendare?*", lernolibreto por labortendaroj, kaj en la 70-aj jaroj aperis amaso da tre teoriaj tekstoj pri lingvo-politiko, lingva imperiismo, strukturo kaj superstrukturo, verkitaj por seminarioj de la tiama ideologie ŝarĝita TEJO.

Ekde 1987 li laboris en la Pedagogiscienca Laboratorio de la Tria Roma Universitato pri aŭtomatigo en ekzamenado, instru-teknologioj, tele-instruado, komputil-scienco, lingva statistiko, terminologio, lingvopolitiko, eksperimenta pedagogio. En tiuj kampoj li publikigis plurajn librojn kaj artikolojn. Lia bibliografio ĝis la komenco de la nova jarmilo estas videbla en <http://lps2.uniroma3.it/lps/biblio-curr/bibliografie/la-torre-biblio.htm>.



La familio La Torre (maldekstre) kun du filinoj de Stefan MacGill en parko de Klampenborg, Danlando, dum la ekskursa tago de la 36-a Konferenco de ILEI en Örestrand, Svedio, 2003. (Foto de Stefan MacGill)

Ankaŭ en tiu nova labor-situacio li kontribuis multon al Esperanto. Li starigis la projekton InterKulturo kun la *Kvazaŭa Lernejo Tibor Sekelj* [Kvazaŭa estas la vorto por "virtuala". Nur li kaj mi uzis tiun vorton, dum la ceteraj esperantistoj preferas prunti ĝin el naturismaj fontoj]. Tiu projekto estis la unua en ILEI, kies prezidanto intertempe li iĝis, kiu utiligis la reton grandskale por kunligi klasojn tra la mondo. Ankaŭ pro tio li ricevis la titolon "*esperantisto de la jaro*" en la jaro 2000.

Intertempe, kvazaŭ iom flanke, li gvidis korespondan kurson pri Esperanto por deĵorantaj instruistoj en italaj lernejoj. Temis pri oficiala kurso de la universitato. Tre malofta okazo ne nur en Italujo.

En la esperantologia kampo, li kunlaboris en la terminara komisiono de *IAdEM* (li estis baze matematikisto), verkis lernolibrojn kaj artikolojn precipe pri vortaraj kaj terminaj problemoj. Li redaktis lingvopolitikan rubrikon en instruista fakrevuo *Cadmo*, respondecis pri la lerneja instru-eksperimentoj koncerne influon de E-lernado al la lingvo-konscia kapablaro, kaj projektis *LIL* (Lingva Interreta Laborejo), por la trejnado de lingvoinstruistoj. Li esti regula kontribuanto al la Internacia Kongresa Universitato kaj al la ILEI-konferencoj.

Li estis ankaŭ dum la lastaj jaroj membro de la Akademio de Esperanto. Malmultaj esperantistoj estus povintaj fari ion plian en nur unu vivo.

Li ĵus mortis, la 25-an de marto 2010. Plenega salono de la Tria Roma Universitato partoprenis en lia funebra ceremonio, dum kiu oni parolis pri liaj tri grandaj viv-temoj: Esperanto, Demokrata Lernejo kaj Instru-sciencia laboro.

Jen kelkaj reagoj al la retmesaĝo de Renato CORSETTI, en kiu li informis la mondon pri la forpaso de Maŭro:

Kia ŝoko! Hodiaŭ mi legas miajn retmesaĝojn kaj eksciis pri la morto de Maŭro LA TORRE. Li estis juna, proks. 60-jara, ĉu?, edzo, patro de junaj infanoj. Li estis tiom kapabla, lerta esperantisto, fakulo, saĝulo. Giganta perdo por nia movado. Mi estas tre trista. Li estis amiko, bona amiko, konsilanto, gvidanto. Dum la UK en Bjalistoko mi filmis 14 personojn, por kapti ilian akĉenton. Mi filmis Maŭron, kiu parolis kun belega italeca melodio pri siaj planoj ferii post la UK en Dolomitoj, en tiuj belegaj montoj de la nordo de Italio, kie mia forpasinta edzo emis montgrimpi. Nome de Internacia Ekzamena Komisiono mi diras plej elkorajn kondolencojn al lia familio kaj amikaro.

Mireille GROSJEAN (Svislando)

Ho ve! malĝoja ŝoko ja! Mi ne eĉ iam renkontis Maŭron persone, sed li mankas al mi. Li helpis min ordigi miajn pensojn pri instrumaterialoj por Montessori-lernejoj, antaŭ du aŭ tri jaroj, kaj ili estas nun pretaj por esti lanĉotaj ĉi-monate. Mi esperis dividi la novaĵon kun li.... Nu, ripozu pace, Amiko.

Penny VOS (Aŭstralio)

Maŭro ekde la fondiĝo subtenis nian Internacian Laborgrupon por Antaŭenigi la Lernejan Instruadon de E-o. Ni profunde funebras.

Kara Renato! Bonvolu transdoni la kondolencan de nia pli ol 200-membra, internacia komunumo al la familio. Maŭro restos poreterne kun ni.

Ludoviko kaj Julinjo MOLNÁR (Hungario)



Estrarkunsido kun gvido de Maŭro LA TORRE en novembro 2001 Érđ (Hungario). De maldekstre: Jozefo NÉMETH (red.), Boo Mee KIM-LINDBLOM(†), Stefan MACGILL, Agneta EMANUELSSON, Maŭro LA TORRE(†), Sabine TRENNER, Radojica PETROVIĆ. (Foto de Jozefo NÉMETH)

Ne estas juste foriri sen ke la geamikoj havu la tempon esprimi kiom da estimo kaj da rekono ili ŝuldis al li. Mi nenion sciis pri lia malforta sanstato kaj la sciigo pri lia forpaso trafis min treege forte. [...]

Kiom da rememoroj aperas en nia menso! Ankaŭ al Parmo li venis por paroli en la Universitato. Kaj ankoraŭ okaze de la ILEI-Konferenco en 2006. Kaj kiam mi bezonis iun konsilon, iun helpon, je li mi ĉiam povis kalkuli.

Nun mi imagas, ke lia spirito estas revenanta al la valo de Funes, ĉe la piedoj de la Grupo "Geissler", en la koro de Dolomitoj, por trovi tiun silenton kaj tiun kvieton, kiujn li tiom amadis.

Al lia edzino kaj al la amata filino, kun kiuj mi povis konatiĝi dum la Festivalo de la Gejunuloj en Jesolo, mi esprimas miajn plej sentoplenajn kondolencojn

*Luigia OBERRAUCH MADELLA
Asocio-Esperanto "Giorgio Canuto" de Parmo (Italio)*

Estas esperantistoj, kiujn mi zorge priatentas kaj prinotas, kiam ili parolas pri nia lingvo aŭ pri nia movado. Maŭro estis unu el ili.

Liaj prelegoj ĉe ILEI-Konferencoj kaj ĉe la *Tago de la Lernejo* de UK estis modelaj prezentoj de lingvaj kaj pedagogiaj temoj, je kiuj ĉiuj seriozaj esperantistoj povas profiti.

Kvankam la profundpensa kaj bonkora Maŭro forpasis eble jardekojn antaŭ ol la ĝusta, deca momento, liaj prelegoj, liaj artikoloj, liaj komentoj, kaj eĉ – feliĉe pro la surbendigado de Mirejo en Bjalistoko – lia bela voĉo povas resti inter ni.

Eble nun estas bona momento, finfine, komenci meti artikolojn pri pedagogio kaj lernado de E-o en la retejon www.ilei.info. Unu nova rubriko: *Dokumentoj pri Pedagogio*. Unu nova subrubriko: *Maŭro La Torre*. Kaj la multnombraj artikoloj, la prelegoj, la komentoj kaj ĉio, kion Maŭro diris pri E-o. ... kaj lia voĉo.

*Dennis KEEFE
Universitato de Nankino (Ĉinio)*

La 26-an de marto, konsternita, mi legis la mesaĝon, kiun Renato CORSETTI sendis al la listo "esperantisti-romani-e-laziali": "Tiun ĉi nokton, en roma malsanulejo, mortis granda roma esperantisto, Maŭro LA TORRE, kiu estis aktiva ano de la roma grupo dum multaj periodoj de sia vivo..."

Ĉu Maŭro mortis? Ne eblas! Mi vizitis lin la 19-an, kaj mi havis bonan impreson. Lia edzino telefone konfidis al mi, ke lia malsano estas tre grava, sed kiam mi vidis lin, mi tute ĝojis. Li ne havis la vizaĝon ruinigitan kaj benditan kiel mia patro, kiu havis la saman malsanon. Li sidis sur la lito kaj, afable, ni parolis pri E-o, pri lernejestroj, pri venonta regiona voĉdono. La tempo pasis tre rapide, kaj li respondis al mia "ĝis revido, baldaŭ mi venos viziti ankoraŭ vin" preskaŭ gaje, ridetante. Estis evidente, ke nia renkontiĝo donis bonfarton al ni ambaŭ.

Mi tute ne povis imagi, ke nia "ĝis revido" estus al lia funebra ceremonio. Ne, li ne mortis. Li vivas en la koro de ĉiuj e-istoj, kiuj havis la bonŝancon koni lin kaj aprezi lian agadon kaj liajn projektojn, ĉiujn rimarkindajn, inter ili certe la projekton *Interkulturo*, kun la virtuala *Lernejo Tibor Sekelj*.

Maŭro, serioza homo, eble tro serioza, mi ne forgesos vian lastan ridetantan vizaĝon!

Filomena CANZANO (Italio)

Karaj kolegoj,

Mi volas en la nomo de la nuna estraro de ILEI kaj de la tuta Ligo esprimi profundan kondolencon pro la forpaso de nia kolego kaj iama estrarano kaj prezidanto de ILEI. Niaj pensoj kaj kunsentoj iru al la familio kaj proksimaj amikoj de Maŭro. Ni dankas al Renato, ke li parolis nianome en la funebra ceremonio. En nia hejmpaĝo eblas legi nekrologon el la plumo de nia vicprezidanto, Duncan CHARTERS. Pezakore, ni turnas nin reen al nia taskaro, ke la aspiroj de Maŭro kaj de niaj aliaj antaŭuloj havu ŝancojn realiĝi.

Stefan MACGILL, Prezidanto, ILEI

E-o kaj interlingvistiko en superagradaj lernejoj: Ĉu malapero? Ĉu eblas novaj vojoj?

de **Ilona KOUTNY**, Gvidanto de Interlingvistikaj Studoj de UAM, Poznań (Pollando), <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html>

La instruado de E-o kaj interlingvistiko en altlernejoj kaj universitatoj estas strategie grava por la prestiĝo kaj la praktika instruista trejnado. Por la akcepto de E-o kiel lingvo kaj objekto de sciencaj esploroj batalis kaj intense laboris ankaŭ István SZERDAHELYI en la budapeŝta universitato ELTE, kaj kontribuis al la formado de multaj E-instruistoj.

La instruadon de Esperanto kaj interlingvistiko en altlernejoj kaj universitatoj eblas sistemigi laŭ ĝia **statuso**: 1) ekster studprograma studrondo, 2) oficiala kurso, 3) memstara studprogramo; laŭ **tipo**: 1) lingvo-kurso, 2) scienca prelegaro aŭ kurso, 3) faka kurso en E-o, 4) kompleksa studprogramo; kaj laŭ la **celo**: 1) informi pri E-o kaj interlingvistiko, 2) "baki" esperantistojn kaj 3) formi profesiulojn (Koutny 2001). Speciala tereno estas la instruado de E-o en universitatoj de la tria aĝo.

El la lasta listo de superagradaj lernejoj de Pirlot (<http://www.ipernity.com/blog/32119/234890>) evidentiĝas, ke la tuta nombro de superaj lernejoj estas pli malgranda, ĉ. la duono, kompare kun tiuj en la 80-aj kaj 90-aj jaroj (la statistiko fine de la raporto montras nombron inter 90-125 por tiu periodo). Ne plu aperas la Humboldt-Universitato en Berlino, la Eötvös-Universitato

en Budapeŝto, la tradiciaj instruejoj.... Verŝajne ne ĉiuj kolegoj anoncis sian kurson. La listo en <http://egalite.freeweb.hu/listo/triagradaj.doc> anoncas nur 40 instituciojn, kvankam aperas tie kelkaj aliaj ol en la listo de Pirlot. Ĉu la instruado de E-o kaj interlingvistiko retiriĝas de la pli alta nivelo kaj pluvivos nur en kluboj kaj en la reto?!

Analizante la datumojn de Pirlot ni vidas, ke la plejmulto da superaj lernejoj ofertas **lingvokursojn** (46 el 60 kursoj) de inter 1 kaj 4 semestroj, kio en si mem ankoraŭ ne estas universitata traktado de esperantologio, servas al informado pri E-o, eventuale al "bakado" de e-istoj.

Okazas en kelkaj universitatoj **kursoj pri E-kulturo aŭ interlingvistiko** (11 kursoj). Kursoj pri lingvopolitiko aŭ interkultura komunikado, en kiujn eblas enplekti la alternativan solvon de lingva problemo, ne estas sufiĉe eluzataj, kvankam tie nature eblas trakti la rolon de E-o.

Kompleksaj programoj apenaŭ troveblas. La fama E-fako de ELTE, kiu funkciis dum 43 jaroj en la kutima sistemo de universitataj (en la lasta fazo kiel altlernejaj) fakoj fermiĝis en 2009. Kompleksan programon ofertas nuntempe la Interlingvistikaj Studoj de UAM en Poznań, en formo de 3-jaraj postdiplomaj studoj, parte distance pro la internacia partoprenantaro. Same UAM donas lokon al la unujara instruista trejnado de UAM kaj ILEI. La programo en Leipzig restis nur provo. Esperiga estas la iniciato en la Universitato de Szeged, enkonduki E-on en la formadon de kulturaj manaĝeroj. Tamen la fakaj studobjektoj tie estos plejparte hungare. La ĉefa profilo de la Universitato en Karlovo (Bulgario) estas turismiko, sed E-o havas gravan lokon.

La uzo de E-o en la instruado de aliaj studobjektoj daŭre estas la specialaĵo de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj), sed manke de propraj konstantaj lernejo kaj instruistaro, ĝia agado ne povas disvastiĝi. Kelkaj lernejoj kiel la turisma fako en la universitato de Karlovo kaj la postlicea Turisma Lernejo en Bydgoszcz (Pollando) kunlaboras kun AIS.

El la faktoj prezentitaj en la raporto de Pirlot konkludiĝas, ke la ĉefa celo de universitata agado samas kun tiu de aliaj e-kursoj, do informi pri E-o kaj "baki" esperantistojn. „*Esperanton en lernejojn*” – estas la slogano. Sed mankas diplomitaj kaj bone pretigitaj instruistoj! Nur pli bona kaj pli interesa instruado povas resti en konkurso kun aliaj fremdaj lingvoj. Necesas la kono de modernaj instrumentoj kaj eluzo de riĉaj spertoj de Esperanto en interkultura komunikado.

En la nova eŭropa ekzamensistemo E-o havas sian normalan lokon apud la aliaj lingvoj. Eblis enkonduki tion pere de la hungara ĉi-terena institucio ITK danke al la ekzisto de ELTE-diplomitoj.

La unu-jara **instruista trejnado** – komuna programo de la Interlingvistikaj Studoj de UAM kaj ILEI ofertas solidan formadon al estontaj kaj jam laborantaj instruistoj, koncentritan al metodika trejnado (vd raporton en <http://www.ilei.info/novajxoj/Poznan2010febr.php>) en simila formo kiel la universitata interlingvistika fako: du intensaj semajnoj kaj intertempe laboro hejme kaj rete kadre de *Edukado.net*, profitante ankaŭ el kelkaj kursoj de la aktuala interlingvistika sesio.

Instruemuloj devus klopodi akiri almenaŭ tiun ĉi instruistan diplomon eldonitan de ILEI. Stefan MACGILL, prezidanto de ILEI, alvokis la landajn asociojn kaj sekciojn por subteni la trejnadon de almenaŭ unu persono. ILEI el sia *Szerdahelyi-fondaĵo* kune kun UEA povas subteni kvar kandidatojn.

Pro malmultaj kompleksaj universitataj programoj pri esperantologio kaj interlingvistiko, kaj pro principe internacia bezono de profesia formado, la distanca instruado estas la plej konvena formo. Tiun formon plilarĝigas ankaŭ la Interlingvistikaj Studoj, kie okazas nur unufoje renkontiĝo dum la semestro. Tio necesas por koncize transdoni la materialon kun ĝiaj ĉefaj emfazoj, ekkoni gravajn fakulojn, kune ekzerci kaj preparoli la problemojn (instrui ne eblas teorie!) kaj por ekzamenoj.

Novan formon de **kunlaboro** inter universitataj kolegoj kaj gestudentoj ebligas la Erasmus-projekto (Tytgat 2010). Temas ĉefe pri reciprokaj vizitoj por preparoloj kaj eventuala instruado, akcepto de gestudentoj, kiuj lernas E-on. La brusela Erasmus-Universitato, kie laboras Kristin TYTGAT, jam gastigis studentinon el la universitato de Kaunas. Ĉi-marte mi kun kolego el UAM, Michael FARRIS vizitis la universitaton kun la celo preparoli projekton pri interkultura komunikado. Enkadre de tiu ĉi kunlaboro ŝi gvidos kurson pri tradukado en septembro dum la interlingvistika sesio (tio estos malfermita ankaŭ al aliaj partoprenantoj).

Alia ebla universitata kunlaborprojekto pri pedagogia terminaro ne komenciĝis pro la tragika morto de Maŭro LA TORRE.

La eŭrop-uniaj projektoj principe estas malfermitaj ankaŭ por esperantistoj. Plej esperigaj estas projektoj, kiuj koncentriĝas al iu tasko ne rekte rilatanta

al E-o, tamen enplektante ankaŭ E-on, kiu povas esti la komuniklingvo inter la kunlaborantoj, kiel ekz. la projekto pri *Lingva prismo* de E@I.

La lasta ILEI-konferenco en Krakovo kun sia programo pri universitata instruado – kiun mi gvidis – kaj la nova komisiono pri universitata instruado kadre de ILEI kun la gvido de Duncan CHARTERS, montras la rekonon de graveco de tiu ĉi tereno. La dua renkontiĝo de universitataj instruistoj samkadre estis tamen tre malgrandskala kompare kun la unua en Amsterdamo en 2008. La tiama elano haltis.

Se Esperantio estas sufiĉe matura por universitataj studoj kaj kunlaboroj, tiam ili pli evoluos, se ne, E-o restos inter la hobiaj okupoj.

Bibliografio

Koutny I. (2001): Universitata instruado kaj instruista trejnado. IPR 2001/4: 13-21.

Pirlot, Germain (2010): Esperanto-kursoj organizataj en universitatoj kaj alt-institutoj. (<http://www.ipernity.com/blog/32119/234890>) [korektita versio el 31.03.2010]

Tytgat, Kristin (2010): EU-programoj: ebloj por Esperanto. IPR 2010/1: 14-18.

Propedeŭtika (helpa al lernado) valoro de E-o

de Mireille GROSJEAN, fremdlingvoinstruisto (Svislando)

Kolego CORSETTI priskribis en duparta artikolo (vd IPR 09/4, 10/1) la esplorojn de kelkaj el niaj pioniroj. Reage kaj kompletige mi ŝatus aldoni du aspektojn.

La tri ecoj de modelo. (Laŭ FRANCK)

Oni lernas per modeloj.

Ekzemploj: garaĝisto lernas, kiel aspektas motoro, pere de motoro plasta, nefunkcia. En kemio oni lernas, kiel aspektas kaj ligiĝas la molekuloj, ludante permane kun plastaj molekuloj, kie la atomoj estas koloraj kugloj kaj la interatomaj ligoj estas bastonetoj. En anatomio la baldaŭaj kuracistoj disponas je korpo nekarna sed plasta, kiun ili povas observi, malmunti,

remunti, priskribi tuŝante ĝin. Dum la lernado en anatomiokurso subite ĉio kuŝas sur la tablo: stomako, hepato, pulmoj, koro ktp.

Same okazas pri lingvoj. Esperanto ludas la rolon de modelo.

Nun ni vidu, kiajn ecojn modelo havas:

SIMPLA ĝi devas esti. Porlerna plasta korpo por kuracistoj, ekzemple, ne havas harojn.

KOMPLETA, PERFEKTA ĝi devas esti. Kuracistoj, kvankam ili vidos amputitajn kaj/aŭ malsanajn korpojn, lernas pere de kompleta, perfekta, normala korpo. Garaĝistoj lernas per bona motoro, ne panea, difekta.

DISERIGEBLA ĝi devas esti. Por lerni bone, iu persono devas povi permane malmunti, remunti, malmunti, remunti, vidi precize la lokon de ĉiu parto de la tuto. La garaĝisto povas malmunti la motormodelon, kemiisto povas malmunti la molekulojn kaj remunti ilin por montri, ke li/ŝi konas la lokon de ĉiu parto kaj majstras la temon. Se restas eroj sur la tablo post la fino de la remuntado, estas problemo....!

ESPERANTO ESTAS SIMPLA, PERFEKTA KAJ DISERIGEBLA, kiel bona, lerniga modelo.

SIMPLA: mankas esceptoj. Preskaŭ ĉio estas vere regula, travidebla. El "Kiam, iam, ĉiam, neniam" oni povas dedukti "Kio, io, ĉio, nenio". En neniuj aliaj lingvoj oni povas eltrovi deduktante. En iun alian lingvon venas bremsanta escepto.

KOMPLETA, PERFEKTA. Kunmetu la tri aktivajn participojn kaj la tri pasivajn kaj la us-an formon kaj vi povas ĉion esprimi. Kunmetu radikojn kaj unu aŭ du afiksojn kaj vi obtenos iun riĉan eltrovon aŭ iun aĉan insulton. Oni povas ĉion diri en Esperanto.

DISERIGEBLA. Vidu tiun vorton, jam ni havas bonegan ekzemplon: dis-er-ig-eb-l-a. Kvin partoj kune komprenigas tre precizan fajnan signifon.

Plie, E-o funkcias kiel lingvo. Ni ne forgesu substreki, ke tiuj modeloj en anatomio, kemio, mekaniko kaj similaj fakoj NE funkcias. Plasta porekzerca korpo ne spiras, ne digestas, ne marŝas. Molekula modelo ne kapablas ligiĝi kun alia kaj esti materion. Plasta motoro tiros nenion. Do la komparo subite ĉesas. **Esperanto estas KAJ modelo KAJ funkcia lingvo**. Per ĝi oni povas verki tekstojn, poemojn, teatraĵojn, diri amdeklaron, sakri aŭ insulti.

La emocia flanko (laŭ PIRON)

Profesoro NÄF el la Universitato de Neuchâtel (Svislando), kiu instruas la germanan, diris al mi: "Kiam oni parolas pri lingvoj, ĉiam estas politikaj aspektoj kaj emociaj aspektoj kaj aspektoj, kiuj rilatas al potenco". Ni lasu la politikajn kaj pripotencajn aspektojn flanke kaj turnu nin al la emociaj.

Oni ricevas lingvo(j)n en sia lulilo kune kun la rideto kaj voĉo de la patro kaj de la patrino. La lingvo estas ilo, kiu alportas al la infaneto la amon de la gepatroj. Melodio, tonoj, voĉoj.... Vortoj... Muziko... Ĉiu persono estas ligita al sia lingvo, kiel al siaj regiono, lando, patrujo.

Per sia(j) unua(j) lingvo(j) oni nomas ĉiujn objektojn de la mondo. Neniam plu oni povos tiel lerni novan lingvon. Per siaj unuaj lingvoj oni konstruas sian mondon en sia kapo, oni malkovras la universon.

Do homo estas ligita al sia lingvo same kiel infano al sia dorlotludila urso, kato, elefanto.

Kiam la instruisto diras dum kurso pri la angla lingvo: "*No french!!!*" (same ni diru: "Ne krokodilu!!!"), la lernantoj fartas malbone, sentas atencon, sentas perforton. Malpermesi uzon de la propra lingvo estas perforto. Tamen estas malfacila paŝo: La lingvolernanto devas iam iel **distanciĝi** de sia unua lingvo. Se la unua lernenda lingvo estas malfacila, tre malsimila al la unua, la denaska, la lernanto sentos malagrablan etoson en si mem. La komenco de la lernado de la angla estas sufiĉe facila; pro tio, multaj lernantoj ŝatas la anglan. Kiam ili atingas la trian lernojaron kaj devas digesti la malregulajn verbojn kaj la multnombrajn neŝanĝeblajn esprimojn, idiotismojn, la etoso ŝanĝiĝas....

La instruisto devas kompreni tiun aspekton de la lernado, klarigi tiun fenomenon kaj helpi la lernantojn fari tiun salton. Se la instruisto estas

denaskulo de la lernenda fremda lingvo, estos malfacile. Dum la kurso la instruisto eble uzos la komunan instrulingvon por klarigi, ofte uzos la lernotan lingvon kaj per ĝi iom teatrumos kun multaj gestoj en amuza etoso. Tiel la lernantoj sentos sin feliĉaj, kuraĝos eksalti en la cellingvon kaj bone lernos ĝin.

Demando: Kiu fremda lingvo estas la plej malfacila por lerni? Ĉiuj aŭskultantoj respondos: se temas pri ruso, kiu devas lerni la ĉinan, Se temas pri japano, kiu devas lerni la anglan, Tamen la respondo estas tute simpla: LA UNUA! Ĉar en tiu momento oni devas forlasi sian denaskan lingvon (aŭ siajn denaskajn lingvojn), flankenmeti, ne tute forgesi, sed tamen iomete forlasi ĝin... distanciĝi. Homoj, kiuj uzas plurajn lingvojn, diras ofte: kiam vi lernis unu fremdan lingvon, vi povas poste facile lerni aliajn. Tio estas pruvo.

Mi aldonu plian konstaton de PIRON: ĉar Esperanto havas logikan flankon kaj vastajn eblojn por kreema parolanto, la du duonoj de la cerbo de la lernanto kunlaboras plej harmonie. El tio venas sento de feliĉo ĉe la lernanto.

Post sukcesa komenco ĉu simila daŭrigo?

de **Katalin KOVÁTS** (Hungario/Nederlando)

La novtipaj UEA-ekzamenoj, ellaboritaj laŭ la normoj de la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER) kaj okazigitaj kune kun la Ŝtata Lingvokezamena Centro (ITK) en Hungario, en 2009 havis sian unuan jaron. Dum tiu periodo estis aranĝitaj 10 ekzamensesioj kun 126 kandidatoj je tri niveloj (B1, B2 kaj C1). Kvankam en Francio mem ne okazis sesio, francoj (kun 23 ekzamenoj) estis la plej diligentaj kaj strebis je oficialaj testado kaj agnosko pri siaj lingvaj konoj kaj kapabloj. En la sekvaj lokoj staras germanoj (19), nederlandanoj (10) kaj belgoj (8). El ekstereŭropaj landoj la vicon gvidas Brazilo, de kie 6 personoj transpasis sukcese ekzamenon. En la dua jaro ĉu ni sukcesos superi la kvanton de la debutjaraj kandidatoj? Ĉu al akiro de atestilo pri la lingvaj konoj strebos ne nur junuloj kaj instruistoj, sed ankaŭ aliaj esperantistoj?

La faktoj, ke en Strasburgo, ĉe la Konsilio de Eŭropo la plurcentpaĝa esperantlingva referenckadro vicas inter la aliaj, pli ol 40 diversalingvaj eldonaĵoj; ke ĉe la Asocio de Lingvotestistoj de Eŭropo (ALTE) UEA ne nur membro estas, sed ankaŭ aktive prezentiĝas dum iliaj konferencoj, estas grandega lingvopolitika venko de E-o kaj esperantistoj. La "geedziĝo" kun la budapeŝta lingvcentro ITK, jam prestiĝa ĉe la menciitaj eŭropaj institucioj, kaj la komuna funkciigo de la unulingvaj E-ekzamenoj, laŭ la jam akreditigitaj normoj de la instituto, donis al la esperantista komunumo faciligojn kaj multkampajn ŝparojn.

Nun estas en la manoj de la e-istaro pruvi, ke ni ne nur strebis al la lingva egalrajteco, sed ke ni volas ankaŭ uzi ĝin. La E-ekzamensistemo pretas, funkcias kaj plenrajte viciĝas inter tiuj de la naciaj lingvoj. La postuloj kaj la niveloj estas plene normigitaj. Nun oni povas akiri atestilon pri kono de E-o, kiu estas kvarlingva kaj kies niveldifinoj klare indikas al kiu ajn kompetentulo, kion la posedanto de la diplomo kapablas fari en la koncerna lingvo.

Kiel ĉiuj novaj aferoj ankaŭ tiu ĉi sistemo bezonas tempon por esti akceptata. Ofte estas kritikata ĝia alta prezo, kiun UEA ne povas pli malaltigi ol ĝi ĝis nun faris, fakte jam nun kompletigante la ekzamen-kostojn ekz. de la B-landanoj. Eblas diri, ke kvalite ne, sed preze jes ja, la KER-ekzameno pri E-o estas multe sub la eŭropa preznivelo de samrangaj, nacilingvaj ekzamenoj. La kunlaborantoj de la ekzamensistemo proponas al E-institucioj, oficejoj kaj movadaj organizaĵoj instigi siajn dungitojn kaj membrojn trapasi la KER-ekzamenon kaj akiri ankaŭ ekstermovadan rekonon. Estus bone se ĉe prijuĝoj de kandidatoj por novaj postenoj kaj subvencipetoj, je kazo de similaj ŝancoj, signifus avantaĝon havi KER-diplomon. Ni montru al ni mem kaj al la eksteruloj, ke ni ne nur parolas kaj ŝatas nian lingvon, sed ĝin ni flegas kaj sur alta, mezurebla nivelo ankaŭ konas. Ni, esperantistoj estas kleraj.

Ĝis nun estas nur unu movada estraro, el kies membroj ĉiuj posedas atestilon pri siaj lingvaj konoj. La *Fondaĵo Edukado.net* intencas montri sekvendan ekzemplon kaj modelon. Bonŝance jam kelkaj landaj asocioj, kiel ekzemple italoj kaj francoj, decidis adapti sian landan ekzamensistemon laŭ la novaj eŭropaj normoj. Tiucela laborseminario okazos dum la Itala Kongreso, kie trapasos la ekzamenon ankaŭ pluraj gravuloj el la landa ekzamenkomitato por mem spertiĝi kaj mezuriĝi kaj kun la celo ankaŭ tiel agnoski la gravecon de la KER-ekzamenoj.



KER-ekzameno en Herzberg (Germanio), aprilo 2009

Se vi ekinteresiĝis sciu ke:

En 2010 estas anoncitaj la sekvaj sesioj: aprile dum PSI en Germanio, julie dum SES en Slovakio kaj dum NASK en San Diego kaj la UK en Kubo; aŭguste dum la Itala Kongreso en Linjano, en oktobro en Indonezio kaj en Herzberg dum TORPEDO, jarfine en Germanio dum IF kaj NR kaj dum JES en Pollando. Detalajn informojn vi trovas en la sekcio *Novaj UEA-ekzamenoj* en la retejo www.edukado.net aŭ skribu rekte al Katalin KOVÁTS, je la adreso redaktanto@edukado.net.

Dujara Comenius-projekto kun granda sukceso finiĝis en Herzberg, Germanio

de **Zsófia KÓRÓDY** (Germanio/Hungario)

Etaj infanoj kun ĝojbrilaj okuloj el tri bazlernejoj, entuziasmaj gepatroj, laboremaj gekolegoj – tiel ni povas plej mallonge resumi la finan eventon de la kelkjara kunlaboro inter la bazlernejo en Bar Hill (Britio), Komlóstetői Általános Iskola (Miskolc, Hungario) kaj Nicolai-bazlernejo (Herzberg am Harz, Germanio).

Kion ni celis? Montri la lernfaciligan rolon de E-o per instruado de la lingvo al junaj, ĉefe 6-9-jaraj lernejoj, montri, ke eblas vekti la intereson de infanoj al lingvolernado, konsciigi ilin pri la propra gepatra lingvo kaj pri estimo al la lingvo de la partneroj. Celo estis ankaŭ montri, ke jam en juna aĝo lingvaj baroj povas malaperi, komunikado, interagado povas sukcese funkcii kaj veraj amikecoj povas ekesti.



Kiel ni komencis? Ni ellaboris la projekton en januaro 2008 kun granda helpo de Malcolm JONES kaj Angela TELLIER, sendis la dokumentojn al la opaj naciaj agentejoj, kiuj prizorgas la 'Dumviva Lernado' programon de EU kaj petis subvencion enkadre de lerneja partnerecprogramo Comenius.

Jam antaŭ la findecido pri la projektsubvencio ni mem organizis la unuan renkontiĝon en aŭgusto 2008 inter la Nicolai-lernejo en Herzberg kaj la brita Bar Hill lernejo, kiu pioniras en la enkonduko de la Springboard-projekto kaj bonsukcese instruas E-on laŭ la speciala instruprogramo. La bonege sukcesinta unua vizito de la brita grupo al Herzberg trankviligis nin kaj kuraĝigis ĉiujn partnerojn al la daŭrigo.

Post la akcepto de la Comenius-projekto komenciĝis la realigo en aŭtuno 2008 kaj postulis de la projektgvidantaj gekolegoj sindediĉon, multe da kromlaboro kaj konstantan interagadon.

Kion ni faris? La E-instruistoj el la partnerlernejoj ekinstruis la klasojn, E-grupetojn en la propraj lernejoj: Tim MORLEY (GB), Ilona FEDOR (HU) kaj Otto KERN kun Zsófia KÓRÓDY kaj kelkaj porokazaj helpantoj. Dum pli ol du jaroj la infanoj el la tri landoj lernis E-on laŭ speciale ellaborita projektmaterialo, ludante, kantante, praktikante. Ili interŝanĝis mesaĝojn, desegnaĵojn, fotojn, kantojn, filmetojn. Foje-foje ili ankaŭ interparoladis per la reto kaj skajpo. En la programo estis ankaŭ la preparado de filmo pri la propra lernejo kaj prezento de la memfarita filmo al la publiko.

Kie kaj kiel ni renkontiĝis? Dum la 2 jaroj ni havis tri renkontiĝojn dank' al la Comenius-subvencio, kiu ebligis la veturadon ne nur de po 6-10 infanoj per lando, sed ankaŭ de patrinoj aŭ patroj – ja temis pri 6-9 jaruloj kun kiuj kompreneble kunveturis ankaŭ la projekt-prizorgantaj instruistoj. La unua kunveno okazis en Bar Hill en aprilo 2009, la dua en Miskolc en oktobro, kaj la lasta en Herzberg inter 9-13 aprilo 2010. Gastoj, gastigantoj ne nur interkonatiĝis, sed profunde amikiĝis. Dum la unua renkontiĝo en Britio oni spertis ankoraŭ iom da distanciĝo, grupiĝo kun samlandanoj, sed la komunaj ekskursoj, ludoj kaj prezentadoj grandparte forigis tion. E-o servis kiel pontolingvo sed la infanoj lernis ankaŭ multajn vortojn, salutadon en la opaj naciaj lingvoj. Urborigardado, ekskursoj al belaj kaj interesaj lokoj zorgis pri tio, ke ili multe spertiĝu pri la kulturo, kutimoj, lingvoj, vivo de siaj partneroj. La gastfamilioj estis ideala loko por la etuloj por ricevi enkondukon en alilanda ĉiutaga vivo, por kunagado kun samaĝuloj, integriĝo en la vizitita socio. Estis ĝojige vidi, sperti, kiel nia planita pedagogia programo realiĝas, kiom senprobleme la infanoj kondukis en la novaj cirkonstancoj, kiom amikeme ili rilatis unu al la aliaj. Post ĉiu vizito fortiĝis la amikeco kaj dum ĉiu adiaŭo eklarmis kelkaj okuloj... Ni certas, ke la travivaĵoj restos neforgeseblaj, la kontaktoj daŭros, la geamikoj gardos la belajn memorojn en siaj koroj.

Kiel finiĝis la projektperiodo? Dum la lasta staĝo en Herzberg okazis minej-muzea vizito en Clausthal-Zellerfeld, ekskursoj al Goslar kaj Bad Harzburg, urborigardado en Herzberg, vizito al la kastelo kaj al la Esperanto-Centro.

La tri projektpartneroj kun helpo de direktoro de Nicolai-lernejo en Herzberg, s-ro Frank KELLER, la kolegaro kaj grupo de gepatroj preparis grandiozan adiaŭan festvesperon. Krom la britaj kaj hungaraj gastoj kaj germanaj gastfamilioj, infanoj partoprenis ankaŭ la aliaj instruistinoj de la lernejo, ĉeestis urbestro Gerhard WALTER, la gimnazia rektoro H.-J.

BÖTEL, geamikoj de la E-grupo kaj multaj aliaj homoj. El Hungario alvenis ankaŭ du instruistinoj de fremdaj lingvoj; la britan lernejan delegacion el Bar Hill akompanis la vicedirektoro s-ro Sanjay MISTRY kun sia edzino.

Ĉirkaŭ 100 homoj ĝuis agrablan adiaŭan festvesperon kun ludoj en E-o, salutoj, paroloj, filmoj, kantado kaj dancprezentado de la infanoj. Oni fotis, filmis, interparoladis, kaj finis ĉion abunda festbufedo.

Tiu ĉi sukcesa projekto kaj internacia evento kreis multajn novajn geamikojn, la lernantoj evidente ekŝatis lingvolernadon, la gepatroj, instruistaro komprenis la gravecon de internacia kunlaboro per E-o. Ni certas, ke tiu laŭdinda kaj imitinda modelprojekto postlasos ne nur multajn fotojn, murafiŝojn, filmojn, ktp. sed havos – kiel ni antaŭvidis kaj planis en la projektpriskribo – bonan varbefikon por la lingvo en la lernejoj, en la urbaj komunumoj, inter gepatroj, parencoj, instruistaro, lernejoj aŭtoritatoj, edukinstitucioj.

Kiel plu? Krom la jam pretaj mallongaj filmoj pri la tri lernejoj estos pretigata DVD-filmo pri la agadoj, eventoj, rezultoj de tiu dujara kunlaboro, kiu resumos ĉion kaj estas sendenda ankaŭ al la naciaj Comenius-agentejoj. (Grandajn meritojn en tiu laboro havas Tim MORLEY, kiu ne nur zorgis pri la esencaj materialoj, sed estis la ĉefmotoro de la tuta projekto.) Krom tio ni ŝatus zorgi pri tio, ke la amikaj, familiaj kaj lernejoj kontaktoj sendepende de la projekto plu daŭru, la spertoj estu transdonataj al aliaj lernejoj, gekolegoj.

Pri la temoj de la projekto, enhavo, detaloj de la instruprogramo ni raportos aparte. Interesiĝantoj pri simila internacia kunlaboro, projektontoj, bv. turni vin al Tim MORLEY, Ilona FEDOR aŭ Zsófia KÓRÓDY.

El la landoj kaj sekcioj...

Aŭstrio

Gerard COOL (1921-2009)

Mortis la 25-an de novembro 2009 en Leibnitz, Aŭstrio, nia nederlanda kolego Gerard COOL. Li pasigis siajn unuajn 17 jarojn en Indonezio kaj poste profesie instruis en Montessori-Liceo en Zeist, Nederlando, kaj Ecole d'Humanité en Svislando. Aldone al matematiko kaj muziko, li ĉiam instruis ankaŭ E-on. Gerard lernis E-on kiel 20-jarulo kaj ekde 1968 kun la

franc-kanada edzino Florence COTE, ĝi fariĝis la ĉiutaga lingvo. Post emeritiĝo ili translokiĝis al Aŭstrio kaj tie li dediĉis multan tempon al verkado: fikcia 4-voluma romano Sava, provoj de matematika lernolibro, artikoloj pri esperantologio. Lia lasta verko Utopio aperos postmorte. Dum la 32-a ILEI-Konferenco en Montpellier (Francio, 1998) li prelegis kun la titolo "Lernejo de Humaneco". La lasta ILEI-Konferenco, kiun li partoprenis, estis en Kaunas (2005), li prelegis pri alternativa lernejo en Alpa montaro (Svislando), kie li iam instruis.

Al la familio ILEI kore kondelencas.

Stefan MACGILL

Brazilo

Esperanto bonvena

Tre malofte granda entrepreno aŭ granda asocio efektive apogas E-on. Sed kelkaj agrablaj esceptoj tamen estas, kaj tiam la disvastigado de Esperanto vere ricevas apogon, simpatian kaj favorojn. Tiel okazas ĉe la "Asocio de Emeritoj kaj Pensiuloj" (45mil asocianoj) de la urbo Volta Redonda – RJ-Brazilo, kie jam de 11 jaroj funkcias senpagaj E-kursoj, kiuj daŭras 7 monatojn, kun ĉiusemajna leciono. La Asocio, en sia bela, granda kaj luksa "Instituto por Zorgado de la Sano de Maljunuloj", vere favoras la instruadon de E-o, ĉar ĝi disponigas al la kurso vastan lernoĉambron kun bona lumigado, bona aerumado, blanka skribtabulo ktp. Pri sia E-kurso la



Asocio ĉiam antaŭinformas la publikon tra diversaj kanaloj. La E-kurso estas konsiderata kiel tre utila okupiĝ-terapio por la maljunuloj kaj junuloj. Je la fino de la kurso la gelernintoj ricevas de la Asocio atestilon pri partoprenado. La instruanto estas la emerita universitata profesoro, inĝ. Alberto FLORES, BEL/UEA-delegito (87-jara, 60 jaroj de E-o), kiu ĉiam disdonas al ĉiu lerninto ekz-on de la valora "Almanako Lorenz".

laŭ la informoj de Alberto FLORES

Ĉinio

Seminario de la ĉina sekcio de ILEI

La seminario okazos inter la 2-a kaj 11-a de aŭgusto 2010 en la Baiyang-shujie-Lernejo, Taiyuan, Shanxi-provinco, kun la ĉeftemo "Pasinteco, nuneco kaj estonteco de E-instruado en Ĉinio". Oni atendas E-instruistojn kaj instruemulojn, kiuj jam posedas E-on sed bezonas plian trejnadon pri lingvodidaktiko kaj interkultura pedagogio, kaj interesitojn, kiuj jam lernis aŭ intencas lerni Esperanton. Eksterlandaj instruistoj: Ronald J. GLOSSOP (Usono), Peter WEIDE (Danlando), Gabriel OLÚBÙNMI SHÓ-DAVIES (Niĝerio).

Pri la fakaj, laboraj, trejnadaĵoj kaj distraĵoj programeroj demandu: GONG Xiaofeng: 13065155677, QQ: 81523339, skajpo: fenja2004, retadreso: <arko.gong@qq.com>

Danio

Bona E-aranĝo - helpanto de instruanto!

En 2010, dum la rokfestivalo en Roskilde apud Kopenhago denove okazos internacia E-laborbrigado (27 junio – 5 julio). Danke al tritaga laboro, la restado de la partoprenantoj estos senpaga kaj personoj dezirantaj labori pli, povos gajni monon. Eblas vidi la informojn kaj rete aliĝi en <http://roskilde.festoklubo.dk/>. Demandojn pri la laborbrigado oni povas fari al Simon Damkjaer HAZARD: <blindulo@gmail.com>.

La eblo viziti tiun plej grandan en Skandinavio rokfestivalon sen pagi la bileton (240 eŭrojn), loĝlokon, manĝaĵojn estas, precipe por gejunuloj, taŭga motivo por eklerni kaj plulerni E-on, kion atestas i.a. spertoj akiritaj en superaj lernejoj de Krakovo.


*Kunlabore kun la organizantoj - DEJO,
Maria MAJERCZAK*

Germanio

AGEI-alvoko al ĉiuj membroj: la Asocio de Germanaj E-Instruistoj havos sian jarĉefkunvenon dum la 87-a Germana E-Kongreso (GEK) la 22-an de majo 2010 inter 16:00-17:30 en *Edith-Stein-Haus, Engelsgasse 1, 67657 Kaiserslautern*. Bonvenon!

Hungario

"Consummatum est" ... d-ro Ferenc JÁKI (1919-2010)



La 26-an de marto 2010 forpasis en Budapeŝto d-ro Ferenc JÁKI, emerita mezlerneja instruisto kaj doktoro pri klasika filologio. Li naskiĝis la 16-an de novembro 1919. E-on li lernis en kurso de Julio BAGHY en 1961. En 1965 li diplomigis kiel E-instruisto. Li verkis artikolojn, prelegis en diversaj lokoj pri la plej diversaj temoj, kiuj respegulis lian vastan terenon de interesiĝo. Per E-o li vizitis tutan Eŭropon, kaj li partoprenis ankaŭ la Pekinan UK-on. Kun prof. István SZERDAHELYI li iniciatis la leĝigon de la elekto de E-o kiel studobjekto en hungaraj lernejoj kaj la starigon de Ŝtata Ekzamenkomisiono, kiun li prezidis de

1967 ĝis 2008. De 1966 ĝis 1969 li kunlaboris kiel tradukanto kaj voĉleganto por la E-elsendoj de Hungara Radio. Dum pluraj mandat-periodoj li estis komitatano kaj estrarano de Hungara E-Asocio, kies Honora Membro li fariĝis. En 1992 Ferenc JÁKI estis elektita Honora Membro de UEA. En 1999 li estis distingita kiel Kavaliro de la Hungara Kulturo. Kiel pensiulo li aperis en 1979 en la vivo de Unuiĝo de Amikoj de Artoj. Malfermante ekspoziciojn li prezentis pli ol 150 kulturhistoriajn prelegojn. Li aperigis plurajn poemarojn en la hungara lingvo kaj ankaŭ skulptis, pentris kaj fotis. Laŭ lia kredo eblas eviti la spiritan indiferentiĝon. Lia slogano estis: „Dum la plugfero plugas, ĝi restos brila, eĉ se dume ĝi uziĝas, tamen ĝi flankenmetita rustiĝas, eĉ se freŝnova!”

En la funebra ceremonio ILEI estis reprezentita de ĝia prezidanto, kio estis menciita dum la digna kaj emocia du-lingva adiaŭo donita nome de esperantistoj, de Imre SZABÓ, la prezidanto de HEA.

Unuaj paŝoj de la Esperanto-kulturmanaĝeroj

En la suda parto de Hungario, en la universitato de Szeged [seged] en septembro 2010 ekos faka formado de organizantoj de E-eventoj. La lingva preparo de la studontoj komenciĝis jam nun, fine de februaro. En la studprogramo de la Andragogia Instituto de la Universitato de Szeged montriĝis eblo je universitatnivela trejnado de E-kulturmanaĝeroj.

La nova studformo estas unujara, oficiala universitata kursaro. En la tria studjaro de la Andragogia Fakoj unu grupo de la studentoj (ĉ. 15-20 personoj) havos eblon specialiĝi pri organizado de E-eventoj. La celoj de la nova fakoj estas: instrui al la studentoj la internacian lingvon je almenaŭ B2-nivelo kaj partoprenigi ilin en kiel eble plej multe da E-aranĝoj, por ke laŭ propraj spertoj kaj la lernitaj fakaj konoj ili povu prepariĝi je altnivela kaj profesia organizado de aranĝoj kaj programoj de la E-movado.

Por la lingva preparo ni petis helpon de Katalin KOVÁTS, redaktoro de Edukado.net, laŭ kies konsilo la lingvan preparlaboron de la studentoj ni komencis jam je duonjaro antaŭ ol la studoj oficiale ekos. Kadre de tio 12 studentinoj partoprenis 3-tagan intensan semajnfinan kurson [vd la foton prenitan el la blogo de Edukado.net ĉe Ipernity] (24 x 45 minutoj) sub la gvido de Petra SMIDÉLIUSZ.

La studentoj ĝuis kaj pozitive akceptis la baze rektmetodan instruadon de movade aktiva, kun la studentoj plimalpli samaĝa junulino (tamen jam diplomita lingvoinstruisto). Petra, uzante ĉefe la materialojn de *edukado.net* kaj la libreton *Poŝamiko*, krome erojn de la lernfilmo *Pasporto al la tuta mondo* aŭtente gvidis la



lecionojn. Ŝi instruis la bazajn gramatikajn kaj leksikajn elementojn de la lingvo, enkondukis la studentojn en la movadhistorion de la Internacia Lingvo kaj gustumigis al ili ĉefe la junularajn aranĝojn. La partoprenantoj

estis preparitaj memstare plulerni, uzante *lernu.net* kaj aliajn retajn eblojn, vortarojn komunikkanalojn. Ekde septembro de 2010 la grupo havas E-lingvokurson sub la gvido de Ildikó LADÁNYI. Kun la organizanto de la projekto, Edit ÚJVÁRI, la grupo lernos ankaŭ pri movadhistorio kaj partoprenos kurson pri faka komunikado per E-o, gvidotan de Petra SMIDÉLIUSZ. La grupanoj studos hungare ankaŭ fakajn studobjektojn kadre de la kursprogramo de event-organizado.

Ni esperas ke la ĵus trejnitoj rapide trovas sian vojon al la junulara E-movado kaj baldaŭ organizos programojn ankaŭ en sia universitata urbo Szeged, plue en la estonteco eklaboros kiel utilaj kaj laborigataj fakuloj dum multaj movadaj aranĝoj kaj en diversaj E-centroj.

Edit ÚJVÁRI

*docentino de la Universitato de Szeged (Andragoga Instituto)
organizanto kaj gvidanto de la nova E-studformo en Szeged*

Kongo

DKEA havas novan komitaton

La seminario de ILEI organizita de s-ro Radojica PETROVIĆ kaj Jose Manuel CONDE LLINARES en la pédagogie universitaire de Kinŝaso UPN en julio 2009 naskis bonajn fruktojn kaj donis novan elanon al la kongolanda E-Asocio, mallonge DKEA, por antaŭenigi la E-movadon en RD KONGO. Post la foriro de niaj supremenciitaj gastoj, la kongolandaj esperantistoj komprenis, ke jam estas la tempo reorganizi sian movadon. Tial la 9-an de aprilo 2010 estis okazigita ĝenerala asembleo de DKEA, kies pozitiva rezultato estis elekto de nova komitato, al kiu oni donis la taskon reorganizi kaj revivigi la movadon en RD KONGO.

Estis elektitaj [*vd ankaŭ la dorsan kovrilon – NdlR*]:

- 1) S-ro JP LUNGIKISA SUMBU (Prezidanto)
- 2) S-ro Victor LUFIMPU LUKOLAMA (1-a Vic-Prezidanto)
- 3) S-ro NLANDU LUYALA (2-a Vic-Prezidanto)
- 4) S-ro Arlain KIZEYIDIOKO MAYINDA (Ĝenerala Sekretario)
- 5) S-ro Evariste MUNUKU wa MULONGO (Kultura Konsilanto)
- 6) Martin LOFEMBA (Administra Konsilanto)
- 7) F-ino Nelly MASEMI (Kasistino)

Tiu nova komitato havas grandan defion, preskaŭ pasis kvar jaroj dum kiuj DKEA ne bone funkciis, tion povas atesti la afrika komisiono kaj UEA, ĉar dum tiu periodo neniu raporto de DKEA estis sendita al UEA. La movado

preskaŭ mortis pro diversaj kaŭzoj, interalie la sociekonomia krizo, la internaj kaj senfruktaj rivalecoj inter la ĉefroluloj de kelkaj kluboj...

Granda malordo regis en la E-movado. Por revivigi nian karan movadon ĉies subteno estas necesa, tial la nova komitato malfermas siajn pordojn al ĉiuj. Niaj kontaktadreso estas: *B.P. 1007 Kinshasa/Limete, RD CONGO, dkeaprezidanto2010@gmail.com, dkeakomitato2010@gmail.com*

Arlain KIZEYIDIOKO

Pollando

Zamenhof-festo en la Zamenhof-lernejo de Zagórnik



Ĉiujare, la 15-an de decembro, en la Elementa Zamenhof-Lernejo de la vilaĝo Zagórnik, en suda Pollando, estas festata la Tago de la Patrono. En 2009, okaze de la 150-a naskiĝdatreveno de Zamenhof, la festo estis speciale riĉenhava.

Gelernantoj ludis spektaklon pri la vivo de la kreinto de E-o, akompanatan de fragmentoj de samtema

filmo kaj de multmediaj prezentadoj. La parabolon pri la turo de Babelo rakontis, ene de la spektaklo, pastro. La prezentado transportis la lernejanon en la etoson de la tempo, en kiu la Patrono vivis, permesante ilin pliriĉigi siajn sciojn pri li kaj pli bone kompreni la signifon de lia verko. Estis prezentita ankaŭ metodika spektakleto, per kiu la plej junaj gelernantoj montris kiamaniere ili lernis la E-lingvan himnon de la lernejo. Per kanto pri koboldetoj estis vidigita facila maniero lerni la lingvon.

La standardon kaj himnon de la Zamenhof-lernejo eblas vidi en la lerneja hejmpaĝo: http://www.spig-zagornik.um.andrychow.pl/spig-zagornik/Glowna.php?title=Patron_szkoly.

Por la scenaro de la spektaklo estis uzita la malnova, bona romano por gejunuloj „Chłopiec spod zielonej gwiazdy” (La knabo de sub la verda stelo) de Maria ZIÓŁKOWSKA, la nova libro „Zaczęło się na Zielonej” (Ĉio komenciĝis ĉe la Verda) de Zbigniew ROMANIUK kaj Tomasz WIŚNIEWSKI, kaj citaĵoj el brilaj artikoloj pri E-o de la juna krakova esperantistino, membro de la tiurba Rondo de Junaj Ĵurnalistoj-Esperantistoj, Krystyna

HAWLENA-KRZEMIŃSKA. La scenaron prilaboris la instruistinoj Danuta KIERCZAK kaj Władysława MALCZYK. La unua el ili fervore gvidas E-okupojn en tiu lernejo. Ŝiaj gelernantoj dufoje reprezentis la lernejon E-lingve en la regiona fremdlingva artkonkurso por lernejoj „Alproksimiĝu al la mondo” (2006, 2008) kaj gajnis la duan kaj la unuan premiojn en la lingva kategorio: Esperanto.



Maria MAJERCZAK

Por via notlibro...

Reta Instruista Trejnado ĉe *Edukado.net* (RITE) estos lanĉita en aŭtuno 2010

de **Katalin KOVÁTS**, gvidanto de RITE (Hungario/Nederlando)

Por altigi la kvaliton de la instruista laboro kaj tiel pli bone kaj pli efike instrui la internacian lingvon, *Edukado.net*, kunlabore kun ILEI, lanĉos retan trejnkurson por instruantoj.

Ĝi ne celas anstataŭi la jam funkciantajn kelkajn ĉeestajn trejnkursojn (kia ekz. okazas en Poznań), sed volas plivastigi la trejniĝeblojn al tiuj, kiuj ne havas la rimedojn kaj eblojn por partopreni tiutipajn kursojn en foraj landoj. Ni forte pensas pri ne-eŭropanoj, sed ne nur pri ili.

La celo de *edukado.net* lanĉi distancan trejnadon tute kongruis kun la tiudirektaj planoj de ILEI, tial tiu lasta esprimis sian subtenon kaj laŭeblian kontribuon al la sukcesa funkciigo de la trejnado.

La Reta Instruista Trejnado ĉe *Edukado.net* estos lanĉita, kiam la nova paĝaro pretos kaj estos jam provita dum kelkaj monatoj. Tial verŝajne RITE startos plene nur en aŭtuno 2010.

La teĥnikaj planoj pretas, la programistoj jam laboras por pretigi la ĝis nun unikan Esperanto-trejnejon, kiu malgraŭ la seriozaj temoj, espereble estos alloga kaj amuza metiejo, kien oni volonte kaj regule revenas por lerni kaj spertiĝi, testi la aliajn kaj esti testata.

Krom la programa fono necesas zorgi ankaŭ pri la enhavo, por kio estis bezonata trovi kompetentajn kaj laborpretajn fakulojn pri la lanĉotaj studblokoj. La instruista teamo pli-malpli kunmetiĝis kaj la kolegoj ekagis por konstrui la programon kaj la testojn. Jen la ĉefaj studobjektoj kaj iliaj gvidantoj:

- Metodiko de lingvoinstruado, trejnado (Katalin KOVÁTS)
- Fonetiko (John WELLS)
- Esperanto-gramatiko (Ilona KOUTNY)
- Interlingvistiko (Wim JANSEN)
- Literaturo (Tomasz CHMIELIK)
- Movadhistorio (Baldur RAGNARSSON)

Flanke de ILEI Duncan CHARTERS kaj Stefan MACGILL, flanke de ESF Mark FETTES pretos kunlabori kaj helpi. Ni antaŭvidas kunlaboron kun la universitato Adam Miczkiewicz el Poznań.

La retkurso havos modularan strukturon kun libera lerno-ritmo. La kursotaskoj estos pritaksitaj de kvalifikitaj gvidantoj, kiuj samtempe mentoros la studadon. Analizo de filmitaj modelaj lecionoj kaj lecioneroj ludos gravan rolon en la kurso, kiel ankaŭ multaj ekzercoj, plenigotaj kaj pretigotaj de la partoprenantoj. Necesos pretigi ankaŭ studprogramojn, lecionplanojn. La kurso finiĝos per ekzameno, kutime per fizika ĉeesto en renkontiĝo kaj tiea prezento de modela leciono.

Tamen gravas atentigi ĉiujn, ke post tiuj studoj, malgraŭ tio, ke ili estos kompleksaj kaj ampleksaj, oni ne ricevos universitatan kaj institucian diplomon. La atesto pri la partopreno estos movada, tamen espereble prestiĝa. Nur tiuj aliĝu al RITE, kiuj venas por la studoj, spertoj kaj praktiko mem.

Post la unuaj anoncoj kolektiĝis jam 70 nomoj el 26 landoj, kiuj interesiĝas pri la studoj kaj kiuj ricevis jam la unuan cirkuleron. El tiu scieblas, ke gravas, ke la kandidatoj havu jam komence la lingvonivelon B2 (laŭ la Eŭropa Referenckadro), pretu sindediĉe labori semajne ĉ. 1-2 horojn (eĉ se komplete laŭ propra ritmo) pli-malpli dum unu jaro, havu komputilan aliron, rekontakton kaj povu pagi la kelkcenteŭran studkoston, difinotan surbaze de la laŭlanda UEA-tarifoj. Tiuj, kiuj sukcese finos siajn studojn, povos rricevi parton de siaj studkostoj. Se vi interesiĝas pri eventuala partopreno en la trejnado kaj deziras esti informita pri la programo, bv. anonci vin – sen ajna sindevigo – ĉe redaktanto@edukado.net por ke ni trovu vin rekte, kiam ni havos konkretajn informojn.

TORPEDo-6 / ILEI-seminario

Seminario pri subvencipetado (SPSP)

renkonto kun fakuloj, projektintoj praktika helpo al projektontoj

AGEI, landa sekcio de ILEI en Germanio invitas interesiĝantojn el Germanio kaj el la tuta mondo al sia Tradicia Oktobra Renkontiĝo Pedagogia organizata de Interkultura Centro Herzberg (ICH)/Germana E-Centro **inter 8 kaj 12 oktobro 2010**.

Celo

- prezenti modelcele sukcesajn internaciajn projektojn por junularo, lernejoj, asocioj
- ekkoni eblojn, vojojn, manierojn por subvencipetado
- renkontiĝi kun fakuloj, ellaborintoj de sukcesaj projektoj (ekz. Comenius, Grundtvig, Erasmus)

Teorio kaj praktiko

- Lernu pri lokaj, regionaj, internaciaj kunlaborebloj, ekkonu la plej gravajn organizaĵojn, ekkonu fakulojn, havu rektan spertinterŝanĝon.
- Tiu kunveno estos grava kaj por spertaj instruistoj kaj por tiuj, kiuj ŝatus ekkoni pli pri subvenci-serĉado por Esperanto.
- Modeloj de ellaboritaj projektoj kun klarigoj, konsiloj je via dispono!

Spertinterŝanĝo

- prezentado de detaloj, spertinterŝanĝo, diskutoj
- lerni la uzon de interreto por serĉado de informoj, por taŭga, rapida maniero de interagado
- trarigardo de projektformularoj, postuloj, ebloj kaj devoj
- praktika helpo por analizi, plani, ellabori la subvencipetojn, lernado per faro
- prezentado de rezultoj de sukcesaj projektoj, raportoj, produktoj de kunlaboro

Planado

- kiel komenci, realigi, administri projektojn
- kiel pli efike helpi projektantojn, subvencipetantojn

Invitotoj, prezentontoj

Fakuloj el kaj ekster la E-movado, reprezentantoj de ILEI, E@I, TEJO, EEU, kunlaborantoj de Interkultura Centro Herzberg (ICH)

Partoprenkotizo

Ĝis 31.05.2010: 35 EUR; ĝis 01.06-31.08 40 EUR; poste 45 EUR.

Subvencio de ILEI estas petebla.

Anoncu vian prelegtemon, prezenton de projekto, ideojn por trakti kaj petojn por konsideri. Prelegantoj kaj kunlaborantoj ricevos rabaton.

Kontakto: Zsófia KÓRÓDY, prezidanto de AGEI, , DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6. +49/5521-5983, zsofia.korody@esperanto.de, <http://ic-herzberg.de>.

Heidi refoje en Indonezio

Post la sukceso de la kursoj en Indonezio, novembre lastjare (vidu www.ipernity.com/blog/edukado.net/201669 kaj IPR 2010/1), Heidi planas plian instruvojaĝon septembre-oktobre ĉi-jare (sept.24-okt.17). Ŝi planas reiri al kiel eble plej multe el la samaj urboj, kaj eventuale aldoni unu-du aliajn urbojn, kie nun junaj homoj mem eklernis post sciiĝo pri la lingvo

pere de la grupo en Facebook: www.facebook.com/group.php?gid=205294336248, instrui kaj, se estas interesiĝo, ankaŭ okazigi ekzamenojn. Ĝus aperis intervjufilmo, en kiu Katalin KOVÁTS, kiu flanke de Edukado.net helpis prepari la metodikan parton de la instruvojaĝo, parolas kun Heidi pri ŝiaj preparlaboro, spertoj kaj rezultoj. La filmo donas utilajn ideojn pri tiutipa laboro por vojaĝantaj instruistoj kaj enrigardon pri la movada vivo en Indonezio. Ĝi spekteblas ĉe: www.ipernity.com/doc/edukado.net/home/video.

La filmo estas ankaŭ aĉetebla kontraŭ 20 eŭrojn, sumo per kiu vi subtenas la novan instruvojaĝon (lernomaterialojn, ekzamenkotizojn...) La subtenmono sendeblas al UEA-konto 'hego-v' kun klara mencio de la celo: 'Heidi en Indonezio' aŭ la DVD-oj pageblas ĉe transpreno ĉe iu el la E-aranĝoj kie ili aĉeteblas. Rigardu por la listo de tiaj aranĝoj kaj pliaj informoj ĉe <http://edukado.net/anoncoj/23292>.



Kurso de Heidi GOES en Jakarta

Eblas ankaŭ subteni la vojaĝon ĝirante vian kontribuon al la Fondaĵo Azio de UEA, same kun mencio 'Heidi en Indonezio'. Tiam vi ne ricevos la filmon, sed povas subteni ankaŭ per pli malgranda sumo.

Kontaktadreso: Heidi GOES, heidi.goes@gmail.com


Labortable

ILEI aktivis depost la apero de la antaŭa numero de IPR:

- Vizito de konferenca komisiito Ana Montesinos al Kubo kaj vizito kun LKK al nia konferencejo portis multajn novaĵojn pri la salonoj, faciligoj, programebloj, ekskursoj, favoraj ebloj por la partopreno de kubaj kolegoj, kaj la paralela seminario pri instruista trejnado. (Fino de dua aliĝperiodo: Majo 15)
- Aperigo de la simpozia kajero de nia konferenco en Krakovo en PDF-formato kun la celo presi cent ekz-ojn fizike. Kontribuintoj kaj tradukintoj jam januare ricevis dank-ekzemplerojn.
- Raportoj de 15 Landaj Sekcioj kaj reprezentantoj estis ricevitaj kaj estas kompilataj.
- Nova komitata retgrupo estas starigita kaj aktivigata cele al ret-voĉdonoj.
- La hejmpaĝo signife riĉiĝis: aldoniĝis oko da novaj varbiloj, informoj pri niaj kasoj kaj fondaĵoj, niaj eldonaĵoj, laborplanoj de la lastaj tri mandatperiodoj, definitiva buĝeto 2010, la seminario en Burundo kaj nova universitata programo en Hungario.
- ILEI faris alvokon al ĉiuj Landaj Asocioj de UEA en Eŭropo oferti stipendiojn por la instruisto-trejna kurso kiu komenciĝos septembre en Poznań, Pollando.
- Aperis marte numero 2009-3 de *Juna amiko*; nova skipo estas aktive trejnata cele al baldaŭa aperigo de numero 2010-1 kaj per tio rekaptado de la eldonritmo. [NdlR: Ĝi fakte eniris presejon apr 28, samtage kiel IPR!]
- Planoj konkretiĝas por Seminario Pri Subvenci-Petado (SPSP) en Herzberg oktobre, paralele kun Torpedo 6 – la faka kunveno organizata de la germana ILEI-sekcio.



smg



Informoj pri ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Mireille Grosjean (prezidanto), Mónika Molnár (vicprez.), Reza Torabi (sekretario), Karine Arakelian, Giridhar Rao, Jérémie Sabiyumva, Han Zuwu

Elekta: Tiekio Isikawa, Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute (gvid.)

Kontrolo: Ulla Luin, Simon Smits, Rudi Koot

Lerneja: Carola Antskog (gvid.), Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Julián Hernández (estrare), Tiekio Isikawa, Marija Jerković, Luigia Madella, Jacqueline Poux, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi

Regulara: Marija Beloŝeviĉ, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas (Estrare: Stefan MacGill)

Terminara: Maŭro La Torre (gvid.), Miroslav Malovec, Ilona Koutny (Estrare: Radojica Petroviĉ)

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Aida Čižikaitė, Renato Corsetti, Ilona Koutny, Radojica Petroviĉ, Kristin Tytgat

Kunlaborantaj institucioj

EEU: Eŭropa Esperanto-Unio. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, cantskog@kolumbus.fi

E@I (Edukado ĉe Interreto): Viťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, info@ikso.net. Tel: +421 902 203 369. Retejo: <http://www.ikso.net/eo/>

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj.

Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74. NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: redaktanto@edukado.net.

ICH (Interkultura Centro Herzberg): DE-37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6, 0049-55215983, Trejnsejnoj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono:

Zsófia Kóródy, zsofia.korody@esperanto.de

FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*): Repr. de ILEI: **Stefan MacGill**

TEJO (<http://www.tejo.org/>): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Radojica Petrović**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Gregor Hinker**.

UEA: *Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*. www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Stefan MacGill**. A-komitatano el ILEI: **Atilio Orellana Rojas**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**.

UNESKO (en neformalaj rilatoj): Reprezentantoj de ILEI: **François Lo Jacomo**, 72, *quai de la Loire, FR-75019 Paris*, francois.lojacomo@wanadoo.fr; **Monique Arnaud**, *Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac*, monique.arnaud@aliceadsl.fr; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60;

Membreco kaj pagado por aliaj servoj

Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) **kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 8 EUR por la A-landoj kaj 4 EUR por la B-landoj.** Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al Julija BATRAKOVA, p/a Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, <persiko@mail.ru>.

La pagoj povas okazi pere de la nederlanda ILEI-konto, al la ILEI-konto ĉe UEA aŭ al la sveda konto:

* Pagoj al la nederlanda konto de ILEI: numero 4676855 ĉe ING Bank N.V., IBAN NL55INGB 0004676855, BIC INGBNL2A. Bv. aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj pagante el ekster EEA (Eŭropa Ekonomia Areo).

* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankokostoj. Indiku viajn nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).

* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Swedbank.

El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT-kodo SWEDSESS.

Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankokostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Hejmpaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIEBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*. **Presado**: Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktejo**: NÉMETH József, *HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5*,

<jozefo.nemeth@gmail.com>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-89) 356-050. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <r.moerbeek@wanadoo.nl>.

La nunan numeron ni sendis al la presejo 28 aprilo 2010, redaktofino por la sekva numero 15 aŭgusto 2010.

*Foto sur la dorsa kovrilo supre: Comenius-projekto en Herzberg (vd p.25),
malsupre: DKEA havas novan komitaton (vd p.33).*



KER-ekzameno en Saarbrücken (Germanio), 2009 (vd p.23)



Instituto por Zorgado de la Sano de Maljunuloj (vd p.29)

